



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2018 (213)

14. 6. 2018

20 jaroj de E-mental'



La 5-an de majo 2018 pasis 20 jaroj ekde la fondiĝo de la klubo E-mental'. E-mentalanoj vigle festis la jubileon dum sia kunveno la 2-an de majo. Ni elkore gratulas kaj deziras al la klubo en venontaj jaroj multe da feliĉo, amikeco kaj ĝuado de la vivo kun Esperanto.

(legu plu sur paĝoj 3–6)

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
E-mental' solenas sian 20-jariĝon!	3
Rozhovor s Vlastou Pištíkovou	6
Návrat kardinála Josefa Berana	7
Komponisto Ivan Acher	12
Mozart en Bertramka	15
Pri kamentubisto	19

O časopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz

✠ Ni bedaŭre anoncas, ke la 17-an de aprilo 2018 mortis **Markus Beyer** – germana esperantisto, membro de E-mental’, ofta gasto de aranĝoj de la Praga klubo kaj diligenta korektisto de nia Bulteno.

Okazintaĵoj en la printempo 2018

13–15/04/2018 – E-mentala socia kaj gastronomia aranĝo *13-a BIERo* en Třeboň

02/05/2018 – festo de la 20-a datreveno de la klubo E-mental’

17/05/2018 – prelego de Stanislava Vodičková pri kardinalo Josef Beran (*Archiv bezpečnostních složek, Praha–Braník*)

27/05/2018 – E-mentalanoj partoprenis la karitatan projekton Briko

31/05/2018 – volontuloj preparis katalogon de la libraro de nia klubo

14/06/2018 – aperis Bulteno No. 2/2018

La 11-a versio de Granda Vortaro Esperanta-ĉeĥa

En la retservilo www.esperanto.wz.cz aperis nova, ege plivastigita, jam la 11-a versio de Granda Vortaro Esperanta-ĉeĥa de Josef Hron. Tiu ĉi versio estas prilaborita refoje en la programo Excel, nun en la versio 2016. Kompare al ĝisnunaj eldonoj de la vortaro ĝi havas signifajn avantaĝojn, ĉefe subenŝargado de la vortaro el la reto en la komputilon estas tre rapida, temas pri afero por kelke da sekundoj. Plia, pli detala interpreto pri la vortaro estas en datumaro „Úvod a návod“ en la sama, supre menciita retservilo.

Slavnostní odhalení pamětní desky Františka V. Lorence

Místní knihovna Vrdy spolu s obcí Vrdy Vás srdečně zvou v neděli 8. července od 14:00 na Slavnostní odhalení pamětní desky Františka Vladimíra Lorence na knihovně, která od 1. července 2018 bude mít tu čest nést v názvu jeho jméno. Pamětní deska s reliéfem F. V. Lorence (1872–1957) je dílem sochaře a restaurátora Zdeňka Myslivce. Akce se uskuteční v prostorách před knihovnou v Tylově ulici č. p. 25 v Dolních Bučicích. Před slavnostním odhalením proběhne esperantské setkání v Čáslavi (10:30 – 13:30 prohlídka města a společný oběd) a návštěva Lorencovy rodné vsi Zbyslav. Sraz v 10:30 před vlakovým nádražím.

Termíny schůzek klubu září – prosinec 2018

6. a 20. září / 4. a 18. října / 1., 15. a 29. listopadu / 13. prosince
V červenci a v srpnu schůzky neprobíhají.

Humura klubo E-mental' solenas sian 20-jariĝon!

Pavla Dvořáková

Antaŭ dudek jaroj, la 5-an de majo 1998 je 19:15, en la praga parko en Letná estis fondita unika klubo E-mental'. Kio kaŝiĝas sub ĝia nomo kaj kion ĉion ĝi entreprenas?

La esprimo E-mental' aludas, ke ĝi estas destinita por homoj pro Esperanto „mense trafitaĵ“ kaj samtempe kun pozitiva rilato al gastronomiaj kaj aliaj ĝuoj kaj ĝojoj, kiujn la vivo ofertas. La klubo strukture ne estas parto de la klasika Esperanto-movado kaj disvastigo de Esperanto ne estas ĝia ĉefa celo. Ĝi orientiĝas precipe al homoj, kiuj volas Esperanton uzi praktike kiel plenaloran lingvon dum neformala vojaĝado kaj ekkonado de la mondo, kreema amuziĝo kun la geamikoj, sed ankaŭ dum sencohavaj bonfaraj aktivecoj.

Laŭ la „statuto“ E-mental' estas Klera (Iluminita) Despotismujo – sendependa kaj propravola. La registaro konsistas el Diktatorino, ministroj, prezidantoj de oficoj, ambasadoroj kaj superambasadoroj. Por eviti antaŭbalotajn batalojn, puĉojn, protestagadojn ktp. ĉiuj funkcioj estas dumvivaj kaj nedemisieblaj. El 13 fondomembroj (eksmembroj de la Junulara Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio) la klubo kreskis je ĉ. 50 Esperante parolantaj personoj kaj pluaj favorantoj ne nur en la tuta Ĉeĥio, sed ankaŭ eksterlande.

Multaj el ili samtempe membras en Ĉeĥa Esperanto-Asocio aŭ Ĉeĥa Esperanto-Junularo, sed ne temas pri kondiĉo aŭ nepra regulo. Diktatorino de la klubo estas Vlasta Piščíková el Prago, kiu estas samtempe motoro kaj ĉeforganizanto de la plejparto de la aranĝoj. En la realigo de la programoj tamen nature aktive partoprenas ankaŭ ceteraj membroj. Plej nombras t.n. mezaĝuloj, sed la aĝogamo estas ekde studentoj ĝis pensiuloj. Gravas, kiel kiu mense sentas sin kaj kiugrade li aŭ ŝi estas adaptita al la „e-mentala“ frekvenco.

Regulaj kunvenoj okazas kutime ĉiun duan merkredon vespere en Prago (plejparte ĉe unu el la membroj hejme) kaj ĉiu el ili havas iun konkretan temon, kiu „kolorigas“ la renkontiĝon – ĉu per formo de kvizo pri premioj, ludo, projekciado, kreemaj manlaboroj, sed ankaŭ speco de preparitaj kaj komune ĝuataj bongustaĵoj (kiuj tradicie abundas kaj buntas) aŭ stilo de vestiĝo.

Nemalofte partoprenas ĝin ankaŭ esperantistoj el eksterlando (ĉu portempaj gastoj, ĉu membroj tiumomente vivantaj en Prago), do tial motiviĝo por uzado de Esperanto estas natura. Dum la jaro okazas ankaŭ vico da diversteme orientitaj semajnfinaĵoj en la tuta Ĉeĥio. Kelkaj membroj ankaŭ komune vizitas interesajn kulturajn aranĝojn aŭ komune vojaĝas al Somera Esperanto-Studado en Slovakio.

Dum 20 jaroj efektiviĝis centoj da regulaj kunvenoj kaj aliaj aranĝoj. Pri multaj el tiuj ĉi renkontiĝoj ni informis vin en la Kalendaro de aranĝoj en nia retejo www.esperanto.cz. Jam en 2009 la klubo estis ekspoziciigita en nia Esperanto-Muzeo. Kun la aktivecoj de E-mental' la ĈEA-membroj povis konatiĝi kadre de la prezentaĵo dum la konferenco en Kroměříž en oktobro 2017.

Ne mankas inter ili ankaŭ aranĝoj, kiuj engaĝiĝas en sencohavaj bonfaraj aferoj ekster Esperantujo: ekz. aranĝoj BESTĜARDENO – ligita ne nur kun konkurso pri unubuŝaĵoj, sed ankaŭ kun vizito de la adoptita „infano“ de E-mentalo – pekario Emička. Jam kvinfoje la klubo partoprenis kadre de la aranĝo HELPU HELPI en la tutŝtata projekto BRIKO, kiu subtenas konstruadon de memstara loĝado por mensaj handikapuloj, sed ankaŭ al KURO POR PARAPLE (kiu subtenas personojn suferantajn pro paraplegio) aŭ ŜUBOTELO (koncentriĝanta pri pretigo de kristnaskaj donacoj por la infanoj el socie malfortaj familioj). Tiuj ĉi aranĝoj estas samtempe konvena okazo por videbligo de Esperanto kaj por monstro de tio, ke esperantistoj ne estas ia fermita grupo, kiu zorgas nur pri siaj propraj lingvaj interesoj.

Kadre de la lingva perfektigado la membroj de la klubo i.a. sendas humurajn interesaĵojn al la rubriko Resto de la mondo en la e-mentala retejo. Ili tradukis al Esperanto i.a. ankaŭ menuojn en du pragaj restoracioj U skřetů en Prago 7 kaj en Restoracio V Podskalí en Prago 2 (utiligu tion dum via vizito en la urbo kaj petu ilin ĉe la kelnero!). Ilia verko estas ankaŭ subtekstoj de DVD-oj de la konata komedio de la ĉeĥa fikcia geniulo Jára Cimrman „Konkero de la Norda Poluso“. Kadre de ilia transdono la fama ĉeĥa aktoro (kaj reala kunaŭtoro de la teatraĵo) Zdeněk Svěrák estis nomumita honora membro de E-mental' kaj li permesis senpagan projekciadon de la filmo dum Esperanto-aranĝoj. Se vi estas organizanto kaj havas intereson pri ĝi, skribu al la retadreso de E-mental' (ĉi-paĝe sube).

E-mental' estas sendube specifa fenomeno kadre de la Esperanta komunumo kaj en Ĉeĥio kaj eksterlande. Ĝia koncepto povas esti certe en multo inspira ankaŭ por vivigo de la agado de la „klasikaj“ kluboj!

Restas nur gratuli al la klubo al la ronda jubileo, danki ne nur al oferema kaj inĝenia Diktatorino, sed ankaŭ al ĉiuj, kiuj en ĝia agado ĝis nun partoprenis kaj per sia parto kontribuis al kreo de bona humoro kaj bona etoso dum la aranĝoj kaj deziri al ĉiuj membroj multan energion kaj bonajn ideojn dum realigo de pluaj seriozaj-neseriozaj aktivaĵoj laŭ la devizo ĜUU LA VIVON KUN ESPERANTO!

www.esperanto.cz

20 jaroj de E-mental'

Vlasta Pištíková

La 5-an de majo 1998 kunvenis kelke da pragaj esperantistoj, kiuj je la 19.15 oficiale fondis klubon E-mental'!

De komenca malgranda grupeto E-mental' fariĝis klubo kun preskaŭ 50 E-parolantaj membroj kaj kun vico da favorantoj.

Dum la jaroj okazis:

Pli ol 300 regulaj kunvenoj kun diversspecaj temoj

18x aranĝo VIANDO

17x aranĝo BESTĜARDENO

19x aranĝo KRISTNASKO

11x PIKNIKOJ EN SAKSIO

13x aranĝo BIERo

4x aranĝo KOLBASUMADO EN SAKSIO

5x aranĝo LOKŜUMADO EN BRATISLAVO

16x aranĝo TOSTO POR ZAMĈJO

5x aranĝo HELPU HELPI

kaj aranĝoj PISO, SERE, SELE, ZAMENHOFTAGOJ, KURO POR "PARAPLE", SKATOLO DE ŜUOJ...

Dankon al ĉiuj membroj, kiuj kreis bonegan etoson dum ĉiuj aranĝoj, kiuj kaj aktive kaj pasive partoprenadis, al ĉiuj, kiuj ne hezitis helpi kun organizado, al ĉiuj, kiuj aktive partoprenadis karitatajn projektojn, dankon al ĉiuj subtenantoj!

Helpu helpi 2018

Vlasta Pištíková

La 27-an de majo 2018 okazis jam la kvina aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental' aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.

Ni kolektis monon por 37 brikoj!

La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj...

...kaj enmetitaj en simblon muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas amasoj da turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas niajn Esperanto-brikojn, kaj do oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.

Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke...

...kaj apartan dankon al eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj ne hezitis sendi monon!!!

INTERVJUO

okaze de la jubileo de E-mental'

Ptáme se Vlasty Pištíkové, jak to všechno začalo. Proč a jak E-mental' vznikl? Kdo byli zakládající členové? Nějaké zajímavé zážitky z prvních let?



„Pražský klub tehdy moc nepřál mladým. Takže jsme se scházeli u Květy Krajíčkové nebo u nás doma. Říkali jsme si, že by bylo dobré založit si vlastní klub.

A tenkrát u toho bylo pět lidí: Byla to Květenka Krajíčková, Stáník Krajíček, Lucka Karešová, Jura [Mišurec – pozn. red.] a já.

První schůzka se konala 5. března 1998. A na další schůzce 24. března už nás bylo 11 plus tři děti. A tenkrát jsme se rozhodli a napsali jsme 70 lidem po celé Praze a pozvali jsme je na první oficiální schůzi 5. května 1998 v Letenských sadech. Měli jsme domluveno, že všichni přijdeme oblečení v něčem zeleném a přineseme něco zeleného.

Takže jsme se sešli toho 5. 5. A z těch 70 pozvaných nepřišel vůbec nikdo. Zareagoval jenom jeden člověk a ten nepřišel. Takže se sešlo jenom nás jedenáct, co jsme to svolali.

A od té doby jsme se pravidelně scházeli každých 14 dní. A 24. listopadu 1998 se klub transformoval na *klera despotismujo – sendependa kaj propravola*.

Nejdřív byly jenom schůzky a nemluvilo se moc esperatem. Postupem času se to začalo lepší. A začali jsme pořádát akce. V roce 2002 jsme adoptovali prásátko v pražské ZOO a od té doby se tam každý rok scházíme a slavíme *adoptotago*.

Od začátku jezdili zahraniční účastníci. A to bylo moc dobře, protože byl důvod mluvit esperantem.“

Návrat arcibiskupa pražského Josefa kardinála Berana

Stanislava Vodičková¹



Ve vzpomínkách Josefa kardinála Berana bylo esperanto jazykem lásky. Jeho tatínek v něm totiž vyznával lásku své ženě pokaždé, když si ji chtěl udobřit. Kardinál Beran ovládal několik jazyků, mezi něž patřila italština, latina, němčina a řečtina. Podobně jako i další kněží se také on zajímal o esperanto, v němž viděl možnost univerzální komunikace. Během svého života však neměl příležitost svůj zájem o tento jazyk více rozvíjet, přesto zůstal jeho celoživotním příznivcem.

Sympatizant esperanta a plzeňský rodák Josef Beran se narodil 29. prosince 1888 jako nejstarší ze sedmi dětí v učitelské rodině. Po

maturitě odešel studovat teologii do Říma, kde v červnu 1911 přijal kněžské svěcení a o rok později završil studium doktorátem teologie.

Po návratu do vlasti začal pracovat na různých místech duchovní správy. Mezi lety 1917 a 1928 se stal katechetou a pedagogem ústavu sv. Anny v Praze a od roku 1925 ředitelem škol Kongregace chudých školských sester de Notre Dame. V tomto období hojně publikoval, přednášel, věnoval se psaní a překladům beletrie, aktivně vykonával pastorační činnost, stal se vyhledávaným zpovědníkem a exercitátorem. V roce 1928 byl za zásluhy jmenován arcibiskupským notářem. V únoru 1929 začal svou pedagogickou dráhu na Teologické fakultě Univerzity Karlovy. V roce 1932 byl jmenován rektorem pražského arcibiskupského semináře a od této doby nesl hlavní odpovědnost za formaci budoucích kněží.

Pod ochranou říše

Po nastolení protektorátu Čechy a Morava se o rektora Berana začalo intenzivně zajímat gestapo. Pozornosti neunikla Beranova formace v Římě,

¹ Ústav pro studium totalitních režimů

působení v semináři před zábořem Sudet, obliba mezi věřícími, i fakt, že patřil ke katolické inteligenci. Výhrůžky zatčením se naplnily na počátku heydrichiády. Ráno 6. června 1942 si pro něj přišlo gestapo. Po domovní prohlídce následoval výslech a převoz do pankrácké věznice. Předpokládal, že bude sdílet osud českých vlastenců a v nejbližších dnech bude popraven. Čekala ho však jiná cesta. Nacisté na něj uvalili tzv. ochrannou vazbu a převezli ho do věznice gestapa v Malé pevnosti Terezín a poté do koncentračního tábora Dachau, kam dorazil 4. září 1942. Byl zařazen do kategorie politických vězňů s číslem 35844.

V Dachau nacisté soustřeďovali „nebezpečné“ duchovní ze všech zemí okupované Evropy. Celkem se tu sešlo více než 2750 duchovních ze 134 diecézí a 24 národů.

Rektor pražského arcibiskupského semináře Beran se v táboře shledal s mnoha spolubratry, bývalými studenty, ale také s lidmi, s nimiž by se v běžném životě nesetkal. Byli mezi nimi političtí odpůrci – liberálové, socialisté, komunisté a také duchovní jiných denominací. Vzájemná komunikace křesťanů různých vyznání byla v té době nemyslitelná, avšak osobní zkušenost s nacistickou ideologií už nekladla otázku – zda bude Evropa katolická, nebo protestantská, ale jestli ještě vůbec bude křesťanská. Společně prožité útrapy vedly k přirozenému ekumenismu, k solidaritě napříč konfesemi i politickými stranami a k navazování neobvyklých přátelství. Rektor Beran se zde dočkal osvobození americkou armádou 29. dubna 1945 a čekal ho návrat do vlasti.

Pastýř pro těžkou dobu

Katolická církev měla po válce vysoký společenský kredit. V koncentračních táborech a na popravističích zemřelo více než 120 českých kněží, řeholníků a řeholnic. Diecéze byly po válce zcela zdecimované. Od úmrtí kardinála Kašpara v roce 1941 zůstal také pražský arcibiskupský stolec neobsazený. Pro neklidnou poválečnou dobu vybral papež Pius XII. rektora Josefa Berana, aby jako 33. pražský arcibiskup vedl zdejší církev. V neděli 8. prosince 1946 přijal Josef Beran biskupské svěcení a zároveň byl při této příležitosti intronizován. Ve funkci arcibiskupa prosazoval návrat ke křesťanským hodnotám, usmíření, spolupráci a solidaritu ve všech vrstvách společnosti. Stal se nejen mravní autoritou, ale také oblíbenou „celebritou“ – aktivně se zapojil do veřejného života ve snaze přiblížit katolickou církev společnosti a začlenit křesťanské hodnoty do každodenní lidské činnosti.

V únoru 1948 se jako nejvyšší představitel katolické církve vymezil vůči nastupující totalitní moci. Čelil stupňující se represi a snahám komunistického režimu o získání kontroly nad církví. Při jednáních se státem požadovala zachování podmínek pro fungování církve podle

platného modu vivendi, zatímco cílem komunistů bylo odtržení církve od Vatikánu a vytvoření tzv. národní církve, kterou by řídili prostřednictvím kolaborujících kněží. Neslučitelné představy obou aktérů nakonec vedly k ukončení jednání. Režim nastolil brutální teror: biskupy nezákonně internovali, začaly církevní monstrprocesy, zlikvidovali řeholní společenství a svévolně zatýkali tzv. reakční duchovní i laiky.

Určen k zapomnění

Arcibiskup Beran byl od 19. června 1949 držen „v domácím vězení“. Od 7. března 1951 začalo období jeho čtrnáctileté nezákonné internace na různých místech republiky. Krátce pobyl v Roželově u Rožmitálu, odkud byl tajně převezen na neznámé místo. Podmínky internace byly v mnohém podobné vězeňskému režimu, ale navíc obsahovaly úplnou izolaci od vnějšího světa a absolutní ztrátu soukromí. Arcibiskup nevěděl, kde se nachází, neměl spojení s rodinou, byl mu odpírán i komunistický tisk, takže mnoho let nevěděl, jestli církev ve státě ještě vůbec funguje. Netušil, jak dlouho internace potrvá, jestli bude souzen v některém z inscenovaných procesů, nebo jej „odstraní“ a rodině sdělí, že zemřel „přirozenou“ smrtí.

Komunisté znali jeho vysoký morální kredit a popularitu mezi obyvatelstvem, proto jim nestačilo arcibiskupa jen izolovat, ale potřebovali jej zbavit důvěryhodnosti před veřejností. Už v druhém místě internace, v Růžodolu u Liberce, vynaložili značné úsilí, aby natočili kompromitující film o jeho „nevhodném“ chování k jedné z jeptišek. Do polévky a čajů jim bez jejich vědomí přidávali afrodiziaka a předpokládali, že vlivu prášků podlehnou. Akce trvala více než rok, ale požadovaného výsledku nedosáhla.

V dubnu 1953 arcibiskupa přestěhovali do Myštěvsi a o čtyři roky později do Paběnic u Čáslavi. Přestože se měnila místa pobytu, podmínky zůstávaly stejné: internační dům stál mimo obec, střežili ho příslušníci StB se psy, okna byla stále zavřená, skla zatřená bílou barvou, okolo domu stála vysoká dřevěná ohrada, která vymezovala minimální dvorek pro hodinový pobyt na čerstvém vzduchu. V tomto životním prostoru trávil arcibiskup svůj život v modlitbách za církev a vlast až do roku 1963, kdy mu byla udělena tzv. milost. I nadále se však nesměl ujmout svého úřadu, nýbrž mu znovu určili místo pobytu „pod dohledem“ v Mukařově u Prahy. Zpráva o jeho místě pobytu se brzy roznesla a za arcibiskupem začaly proudit davy lidí z celého tehdejšího Československa. Režim tuto „nepříjemnost“ vyřešil přestěhováním arcibiskupa do těžko přístupného Radvanova. Zde jej v lednu 1965 zastihlo jmenování kardinálem.

Ať si ho tam nechají, doma je nebezpečný

Po složitých jednáních se Svatým stolcem nabídl stát Beranovi odlet do Říma na slavnostní jmenování kardinálem, ovšem bez možnosti návratu. Zato komunisté nabídli změnu ve vedení pražské arcidiecéze – biskup František Tomášek nahradí kolaborujícího kapitulního vikáře Antonína Stehlíka. Stárnoucí arcibiskup Beran v zájmu života církve ve své zemi nakonec přinesl i tuto oběť a přijal „dobrovolně“ osud vyhnance a 19. února 1965 odletěl do Říma. Přesto nikdy nepřestal věřit v návrat do vlasti. Předpoklad komunistů, že se problematického Berana navždy zbavili, se ukázal jako mylný. Kardinál na II. vatikánském koncilu pronesl zásadní projev na téma svobody svědomí, vydal se na cesty za krajany po Evropě a zámoří, promlouval k věřícím „za železnou oponou“ z Vatikánského rozhlasu, zakoupil poutní dům Velehrad, založil středisko Velehrad a zabezpečil vydávání knih a časopisů pro československé katolíky.

Po okupaci Československa vojsky Varšavské smlouvy pohasly šance na změnu poměrů v zemi, a pro těžce nemocného kardinála to navíc znamenalo i konec nadějí na vytoužený návrat do vlasti. Pozemská pouť kardinála Berana skončila 17. května 1969.

Charismatického kardinála Berana se režim bál i po jeho smrti. Nepovolil převezení jeho ostatků do Prahy s obavou, že by tichý obřad přerostl v protirežimní nepokoje větších rozměrů než v případě Jana Palacha. Papež Pavel VI. rozhodl, že bude arcibiskup primas český Josef kardinál Beran pohřben mezi papeži v kryptách baziliky sv. Petra v Římě.

Bezmála půl století po smrti arcibiskupa pražského Josefa kardinála Berana můžeme konečně splnit jeho poslední vůli. V pátek 19. dubna došlo k vyzdvižení jeho rakve a následující den k převozu do České republiky. Z nuceného exilu se k nám vrátil pastýř, kterého naši rodiče a prarodiče nazývali biskupem srdce.





JAZYK PROGRESU A SVETOVÉHO MIERU
ESPERANTO
LINGVO DE PROGRESO KAJ MONDPACO

STU 1

Bratislava, 20. VIII. 67.

Důstojný pane,

Dovolujeme si poslati Jeho Eminenci
nejdůstojnějšímu panu arcibiskupovi
kardinálu Beranovi, posdrav z naše-
ho celostátného esperantistického kon-
gresu. Pratoše víme, že Jeho Eminence
je velkým přívržcem tohoto hnutí
celosvětového jazyka míru, domnívá-
me se, že to Jeho Eminenci zateší,
jak se i u nás v Československu,
tato hnutí vyvíjí. My jsme již
těž několik raků členy Esperanta.

Kongres se konal v Bratislavě a
máme příslibena, že budoucí evrop-
ský j. r. 1968 budeme mít také
v Bratislavě.

Prosim přijmite od nás srdečný
posdrav
mauš. Studen'kovi.

Do římského vyhnanství psali kardinálu Beranovi katolíci z celého
tehdejšího Československa.

LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

Komponisto Ivan Acher

Miroslav Malovec

La 29-an de majo 2017 Max Kašparů transsendis al mi retmesaĝon de Ivan Acher, en kiu li petas, ĉu iu povus esperantigi por li parton de nova opero Suferado de princo Sternenhoch, kiun li komponas por Nacia Teatro en Prago. Mi legis antaŭ multaj jaroj la novelon de Ladislav Klíma pri Sternenhoch kaj restis en mi ion naŭza impresio. Mi demandis nur la muzikeman Pavla Dvořáková pri ŝia opinio, ankaŭ ŝi skribis, ke la verko postlasis en ŝi malagrablajn sentojn kaj ke ŝi timas, ĉu iu ne volas ridindigi Esperanton. Tion mi ne kredis, sed prefere mi ne plu menciis antaŭ esperantistoj, ke mi esperantigas tian strangaĵon. Cetere mi pensis, ke temos nur pri kelkaj frazoj kaj mi volis pruvi, ke Esperanto kapablas traduki kaj esprimi ĉion.

S-ro Acher poste sendadis al mi neregule unuopajn scenojn, en kiuj li indikis per dikaj literoj, kiujn konkretajn frazojn li deziras esperantigi. Ne estis versoj, do mi povis ilin traduki proze. Mi demandis lin, kian sencon havos kantoj, kiujn la publiko ne komprenos, kaj li respondis, ke li volas, ke la spektantoj aŭskultu la melodion kaj ne klopodu deĉifri la vortojn. Tial li elektis lingvon, kiu similas al la itala, sed ne estas la itala. Li eĉ sendis al mi son-specimenon de sopranino, en kiu mi miris, kiel bele oni kantas, sed ankaŭ mi preskaŭ ne komprenis.

Mi devas konfesi, ke tiam la nomo Ivan Acher diris al mi nenion kaj eĉ ne venis en mian kapon ideo serĉi lin per Guglo, kio min nun surprizas, ĉar diversajn aferojn mi guglas preskaŭ ĉiutage.

La 17-an de marto 2018 li invitis min al premiero en Nova Scenejo de Nacia Teatro en Praha, kiu poste okazis la 7-an de aprilo 2018. Mi decidis, ke mi veturos al Prago kaj nur post la spektaklo, kiam mi vidos la rezulton, mi eble konfesos al la esperantistaro, kion mi faris. Sinjoro Acher sendis al mi ankoraŭ la tutan tekston por fari la lastajn korektojn antaŭ presado. Mi miris, kiom da mistajpoj mi lasis en la teksto kaj atentigis pri ili per ruĝa koloro.

La 28-an de marto venis ret-mesaĝo de Miroslav Hruška adresita al la asocia komitato, ke li trovis en la programo de Nacia Teatro, ke oni prezentos novan operon en Esperanto kaj ĉu iu scias pri tio? Do mi konfesis mian esperantigon (en la retejo de Nacia Teatro mankis mia nomo). Leonka Chaloupková tuj reagis, ke ŝi aĉetis bileton kaj ankaŭ ŝi vizitos la operon. Iu atentigis min pri Esperanto-televido, kie aperis intervjuo kun la reĝisoro Michal Dočekal pri la nova opero kun esperantlingvaj subtekstoj. Mi poste konstatis, ke la video estis prenita el Youtube, sed kiu faris la subtekstojn, mi ne scias ĝis nun.

Ivan Acher skribis al mi, ke je la 18:30 mi atendu lin ĉe la kaso, ke li alportos al mi bileton, ĉar estas jam komplete ĉio disvendita, kvazaŭ temus pri koncerto de Beatles. Mi do alveturis al Prago la 7-an de aprilo, iomete promenis tra la stratoj kaj sur la Slava Insulo, poste mi iris al la kaso kaj eksidis sur seĝon sub la ŝtuparo. Subite eksonoris mia poŝtelefono kaj s-ro Acher diris al mi, ke ili ankoraŭ lastmomente ekzercas kaj ĉu mi jam venis. Mi jesis kaj li kuris malsupren, donis al mi la bileton kaj invitis al bufedo en la unua etaĝo. Mi respondis, ke mi ankoraŭ atendas mian koleginon el nia asocio, poste ni venos ambaŭ. Li do denove kuris supren por daŭrigi la ekzercadon.

Kiam aperis Leonka, ni iris ambaŭ supren al la bufedo. Tie jam staris la komponisto kun la reĝisoro ĉe la vendotablo kaj ion trinkis. Mi prezentis Leonkan kiel nian vicprezidantinon, Ivan Acher prezentis sinjoron Dočekal kiel reĝisoron. Li proponis al ni trinkaĵojn, ni iomete babilis, sed poste venadis aliaj homoj, kiuj volis kun ili paroli, do ni iomete retiriĝis.

Leonka havis bileton en la unua vico, maldekstre de la orkestro, mi en la dekunua vico en la meza parto de la spektejo. Mi estis agrable surprizita, kiel bele Esperanto sonas en la teatro kaj verŝajne ni du estis solaj, kiuj komprenis. La ceteraj povis legi super la scenejo ekranon kun tradukoj en la ĉeĥa kaj angla. Mi provis rezigni pri la komprenado kaj ĝui nur la muzikon kiel la cetera publiko, sed ne eblis. Aŭdinte konatajn vortojn mi tuj komencis koncentriĝi pri la enhavo de la paroloj, mi eĉ fermis la okulojn, por ke mia koncentriĝo estu pli forta. Tiam mi vidis, ke sinjoro Acher pravas: kiam la spektantoj komprenas la lingvon, ili ĉesas aŭskulti la melodion kaj klopodas deĉifri la unuopajn vortojn. Pleje al mi plaĉis la koloraturo de Helga (kantistino Vanda Šípová), kiu estis la sola, kiun mi ne komprenis kaj mi vere aŭskultis nur ŝian belan voĉon. Ĉe la ceteraj mi jam komprenis kaj pli atentis, kion ili kantas ol kiel ili kantas.

La fina aplaŭdo estis longa kaj poste en la vestiblo okazis malgranda prezento de la artistoj fare de la direktoro de la teatro. Kiam li alvokis sinjoron Acher, tiu prenis min je la kubuto kaj altiris al la mikrofono. Li diris, ke mi estas tiu, kiu esperantigis la operon, donis al mi la mikrofonon kaj petis min, ke mi traduku al Esperanto, ke „Nacia Teatro pli zorgu pri la artistoj ol pri la oficistoj“. Leonka nin fotis per poŝtelefono kaj ankoraŭ elpetis de profesia fotistino, ke ŝi sendu al ni profesiajn fotojn kun permeso uzi ilin en Starto. Ŝi ankaŭ aĉetis la programojn, en kiu estas presita mia traduko (mi donacis ĝin al nia kluba biblioteko).

Mia trajno forveturis el Prago noktomeze kaj je la 4-a matene mi jam estis en mia lito. Sed per tio la afero ne finiĝis.

Poetino Věra Ludíková skribis al mi, ke ŝi vespere aŭdis en televido intervjuon kun s-ro Acher kaj ke li laŭdis min. Mi trovis la elsendon en la reto kaj tiel mi eksciis, ke sinjoro Acher komponis muzikon por pli ol 150 teatraĵoj kaj filmoj, nur la opero estis lia unua. Do nur nun mi ekkomprenis,

ke Ivan Acher estas muzika gravulo kaj komencis interesiĝi pri lia vivo kaj verkaro.

Mi eksciis, ke li naskiĝis en la jaro 1973 kiel Ivo Šrajer, post gimnazio iris al Teknika Universitato en Liberec, kie li studis tekstilian dezajnon. Sed li certan tempon laboris ankaŭ kiel arbaristo kaj lignaĵisto kaj komencis fabriki proprajn, ofte tute novajn muzikilojn. La muzikon li studis aŭtodidakte, tial li ne estas ŝarĝita de lernejoj ŝablonoj. Male, li eĉ fondis organizon por reamatorigi la profesiajn muzikistojn. Li ankaŭ verkas aŭ adaptas tekstojn kaj mem ilin muzikigas. Li kunlaboras kun muzikgrupoj NUO kaj Agon orchestra kaj komponas por multaj teatroj en Ĉeĥio kaj ankaŭ eksterlande kaj por filmoj artismaj kaj dokumentaj. Plurfoje li estis honorigita, ekz. premion Ĉeĥa Leono li ricevis pro muziko al filmo Odpad město smrt (Rubo urbo morto). Plie li muzikigis dokumentajn filmojn Včely letěly krásně (Abeloj flugis bele), Vězení umění (Malliberejo de arto), Cesta vzhůru (La vojo supren) kaj Tajemství Divadla Sklep aneb manuál pro záchranu světa (Sekreto de la Teatro Kelo alivorte Manlibro kiel savi la mondon), artismajn fimojn Zakázané uvolnění (Malpermesita liberigo) kaj televidan serion Škoda lásky (Domaĝe pri la amo).

Por la Nacia Teatro Brno li komponis muzikon al spektakloj Běsi (Demonoj), Hvězda stříbrného plátna (Stelo de la arĝenta ekrano), Kámen a bolest (Ŝtono kaj doloro), Kdyby, tak, a copak (Se tamen, do kion), Loupežníci (Rabistoj), Růže pro Markétu (Rozoj por Margareta), Vévodkyně kaj kuchařka (Ĉefdukino kaj kuiristino). Por Hadivadlo Idioti (Idiotoj) kaj Ing. Hlaváček (Inĝeniero Hlaváček), Česká měna (Ĉeĥa valuto), iPlay.

Li komponis ankaŭ por aliaj teatroj, ekz. Divadlo Komedie, Divadlo Archa, Divadlo na Zábřadlí, Divadlo nablízko (ĉiuj Praha), Divadlo F.X. Šaldy, Naivní divadlo (ambaŭ Liberec), Činnoherní studio (Ústí nad Labem). El famaj teatraĵoj temis ekz. pri Proceso de Kafka, Vizito de maljuna damo de Dürrenmat, Kapitano Nemo de Verne, sed la plej multaj estis novaj modernaj verkoj: Ostrostřelci, Kvartet, Antiklimax, Sportstück, Vyšetřování pokračuje, Nosferatu, Snílci, Spiknutí, Lvíče, Zajatci. Gäste, Lulu, Touhy a výčitky, Srdce temnoty, Hodina, ve které jsme o sobě nevěděli (Divadlo komedie), Danse Macabre, V 11.20 tě opouštím, Divnej sused, Lola & Mr. Talk, Holdin Fast, Adaptact (Divadlo Archa), Sarah Kane, Camouflage, Píšu z Pekla, Ül (Národní divadlo Praha), Nám můžete věřit, Česká pornografie, Asanace, Přítelkyně osamělých srdcí (Divadlo Na Zábřadlí, Praha), Arabská noc, Jméno, PushUp, Tvář v ohni, Na arše (Divadlo F. X. Šaldy, Liberec), Pohádka o Řaškovi, Krüss (Naivní Divadlo Liberec), Faidra, Malá čarodějnice, Soukromá vichřice (Činnoherní studio, Ústí n.L.), Tvář v ohni, S vyloučením veřejnosti (Divadlo Nablízko), Parazit (Meat Factory Praha).

Plie li komponis por: Alfa Plzeň, Karlovy Vary, Uherské Hradiště, Polárka Brno, Pividadlo Praha, studio Fabrika, 4dny v pohybu, Divadelní Loď Tajemství bří Formanů kaj Český rozhlas.

Silenta somera vespero ...

Sufoka, sed bonodora aero penetras tra malfermitaj fenestroj en teretaĝan ĉambron, en kiu apud la fortepiano sidas pli ol tridekjara viro de malgranda, pli multe ŝvelinta, ol korpulenta talio.

Dum du tagoj kaj du noktoj li ne estas elirinta el sia laborĉambro. Laŭ sia kutimo li estas laborinta kun streĉo de ĉiuj siaj fortoj.

Vane klopodis la dommastro ellogi lin sub la liberan ĉielon en la freŝan, sanigan aeron en la ombroplenan ĝardenon, kuŝantan laŭlonge de la vinberejo Bertramka antaŭ la fortikaĵpordego de Újezd en la silenta valetio inter la okcidenta deklivo de l' altaĵo Mrázovka kaj la orienta deklivo de l' monteto super la tombejo de Malá Strana².

Tiam – en la antaŭlasta dekjaro de la dekoka jarcento – tiuj lokoj estis romantike dezertaj. Sur Mrázovka, nun parte kovrita de l' amfiteatre dismetitaj dometoj de laboristoj, vastiĝis tiam kampoj; sur ĝia norda deklivo estis vinberejo, brikfarejo kaj kelke da barakoj, konataj jam de longe sub la nomo „Poslovina“.

La orienta deklivo kaj la malsupro de l' altaĵo super la tombejo estis tute kovritaj de l' arboj kaj arbetoj; parte fruktaj, parte arbaraj. Ĉi tie estis pli ombre, pli bonodore, pli romantike ol nun; unuvorte la vinberejo Bertramka kaj la ĝardeno, vastiĝanta parte en la valetio sur la malsupro de l' altaĵo, parte sur la altaĵo mem ĝis ĝia supro, estis ĉarma angulo, en kiu flanke de l' ekscitanta bruoj kaj muĝoj grandurbaj oni povis en kvieta izoleco trankvile vivi, revii kaj post turmentoj kaj laciga laboro ripozi ...

Sed la viro, kiun la tiama posedanto de Bertramka estis invitinta, por ke li ripozu en la ĉarma angulo, ne konis ripozon.

Lia spirito eĉ tie ĉi, kie ŝajne estis nenia impulso al la spirita laboro, li febre laboris; li laboris ja kun streĉado de ĉiuj fortoj ĝis la tuta senfortiĝo.

Li klopodis pri la afero treege grava, pri finigo de l' nova opero, kiun li ĵus kun granda entuziasmo komencis komponi. La genia spirito havis komprenon por nenio, sole por melodioj de siaj herooj – ĉio cetera – eĉ la plej kara amuzo, ludo sur bilardo, cedis tute en malproksimon ...

Kaj dum du tagoj kaj du noktoj li ne moviĝis el sia laborĉambro.

La dommastro kaj la amikoj de la gasto, kiuj venis viziti la eminentan gaston, trovis la pordon de l' ĉambro fermita kaj ne kuraĝis interrompi la komponiston ...

Sed la neatingeblaj geniuloj estas tamen ankaŭ malfortaj homoj. Ilia organismo estas venkata de samaj influoj kiel tiu de l' homoj tute ordinaraj

² Kvartalo de Prago.

– ili ankaŭ malsaniĝas kaj laciĝas, en ilia vivo ankaŭ okazas momentoj de l’ tuta laceco, animpremiteco kaj senespero.

Kaj simile ankaŭ Mozart, kiam loĝante vizite ĉe sia amiko en Bertramka, verkis sian genian operon „Don Giovanni“.

Lia senekzempla, senfortiganta laboreco estis jam multfoje avertita de l’ modera laceco en la kreado; sed tio okazis neniam tiel ekstreme kiel tiun ĉi fojon, kiam antaŭe senĉese freŝa, neelĉerpibla fonto de l’ fantazio ŝajnis kvazaŭ subite elĉerpita, dezerta, senfrukta ...

Mozart estis morte malĝoja. Lia spirito ŝajnis vagi en la nebuloj, la koron plenigis neesprimebla premiteco.

Kiel volonte ankoraŭ nun li laborus plue! Sed ĉio kuniĝadis en ĥaoson. Ĉiuj, iam tiel libere kaj vigle el la animo fluantaj melodioj kuniĝadis en malprecizan malklaran ĥaoson – en tutan disonancon ...

Vane li klopodis aŭdigi el la fortepiano sonojn interligitajn, harmoniajn; liaj fingroj zigzage kuradis sur la klavoj aŭdigante sole izolitajn tonojn – ne interligitajn ...

Kaj longe, longe li sidis poste kvazaŭ rigidiĝinta kun mallevita kapo al la brusto.

Subite eksonis de malproksime unuaj akordoj de l’ kanto de najtingalo ...

Nenio plu ol kelke da tonoj – poste denove silento ...

Mozart levis la kapon kaj ekrigardis tra la malfermita fenestro en la ombroplenan ĝardenon.

La suno ĵus subiris; sanga, sed jam paliĝanta sunradiaro superverŝadis per magia lumo la arbojn kaj arbetojn, herbejojn kaj vojetojn, kurbiĝantajn supren sur la kruta deklivo ...

Ĉirkaŭe regis profunda silento. Mozart, kiu post la unuaj tonoj de l’ kanto najtingala momenton aŭskultis, malrapide stariĝis kaj alprosimiĝinte al la malfermita fenestro, rigardis senpense en la ruĝetan malplenan.

Poste li turnis sin malrapide – senpense malfermis la pordon, senpense malsupreniris en la ĝardenon kaj iris malrapide unue sur la vojetoj surŝutitaj de la flava sablo, poste sur la vojetoj ĉiam malpli ireblaj kaj ĉiam pli tordolinie irantaj supren ...

Tiu, kiu renkontus lin, tiu nepre devus pensi, ke li vidas vivantan kadavron havantan atenton por nenio ĉirkaŭ si.

Malrapide, ŝanceliĝante, kun mallevitaj okuloj al la tero, li iris sur la neireblaj vojetoj ĉiam pli supren, ĝis li atingis preskaŭ la supron de l’ altaĵo, de kiu vidiĝis belega panoramo de unu parto de Prago.

Ĉi tie li haltis, nevole levis la kapon kaj ekrigardis la ĉarman pentraĵon de Prago dronanta en la ruĝeta, sed ĉiam pli paliĝanta lumo.

Dum kelke da momentoj li rigardis senpense la pentraĵon.

Sed subite lian animon trakuris penso malvarma kaj akrega kiel ŝtalo – penso neniiganta ...

En tiu animpremiteco kaj laceco li ekpensis, ke „Don Giovanni“, kiun li ĵus komponis, estas destinita por la prezentado en Prago – en la ĉarmoriĉa, antikva kaj glorplena urbo plena de spertaj muzikaj fakuloj – en la urbo, kiu en la paliĝantaj rebriloj de l’ subirinta suno ĵus ensorĉis lin ...

Kaj unuafoje en lia vivo trakuris lian animon la penso, ke li kuraĝas ion neatingeblan, volante sian plej novan verkon, dum kies efektivigado ĉiuj liaj spiritaĵoj preskaŭ tute laciĝis, prezenti por la prijuĝo antaŭ ĉio al Prago. Ŝajnis al li – kaj tio okazas ofte al ĉiu juste kreanta geniulo – ke lia verko estas malforta, nesufiĉe arta fuŝverko – ke ĝia kreinto ne kompreninte la muzikan spiriton de l’ ĉeĥa popolo ne povas kaj ne devas prezenti sian verkon al la fakuloj kun tiel perfekta arta gusto, pro kiu la tiamaj praganoj estis tutmonde konataj ...

Kaj li sentis sin premita, neeldirible premita kaj malĝoja.

De l’ antaŭa spirita penado la malfortigita rigardo vagis sencele de loko al loko, liaj piedoj komencis tremi kaj li devis sidiĝi en la herbon.

Apoginte la kapon per la manplato, li sidis longe en turmenta, dolora enprofundiĝo ... En lia kapo kruciĝis miloj da pensaj fulmoj kaj la senespero enigis siajn akrajn ungegojn en lian animon ...

Dume jam krepuskiĝis; ĉirkaŭe regis profunda silento.

Subite el malluma densaĵo de l’ malsupra parto de l’ ĝardeno profunde sub Mozart eksonis kanto de l’ najtingalo.

Mozart levinte la kapon aŭskultis.

Sed la sorĉplena kanto de la plej glora plumoportanto dolore kaj turmente influis lian ekscititan animon. Ŝajnis al li, ke ĝi grimacas la malfortajn klopodojn homajn, la kuraĝajn klopodojn de ĉiuj, kiuj kuraĝas deziri pli multe, ol kion sopiras kaj penas la homa averaĝo...

Sed kio ĝi estas?

Krom la kanto de l’ najtingalo subite eksonis tra la vespera silento aliaj tonoj ... Ili eksonis de l’ alia flanko – de la plej alta supro de l’ altaĵo post Mozart ...

Mozart aŭskultas dum kelke da momentoj.

La kanto de l’ najtingalo iras de malsupre – la tonoj de l’ homa voĉo de supre ...

Unue la tonoj de l’ ambaŭ kuniĝas – monenton sonas kanto de l’ najtingalo, poste nur la puraj, klaraj tonoj homaj – arĝenta, dolĉa voĉo knabina ...

Mozart salte leviĝinte rigardas ĉirkaŭ si. Sur la plej alta supro li vidas malklaran silueton de l’ knabina staturo kaj laŭ la konturoj li rekonas simplan knabinon vilaĝan, iranta sur la supro kaj – kantanta – ...

Li aŭskultas pli atente.

La knabino kantas kortuŝantan, impresplenan kanton popolan ... La sonoj de l' arĝenta voĉo ondiĝas tra la silenta aero kiel seriozaj demonetoj disportantaj kortuŝon, doloron kaj malĝojon en la homajn korojn ...

La najtingalo malsupre kantas ĉiam pli pasie. Periode superas ĝian kanton la kanto knabina; kelkaj tonoj de ĝia voĉo eksonas ĝojege – sed tiu kanto ne logas plu la atenton de Mozart ...

Li vidas sole malklaran, ĉiam pli malproksimiĝantan siluenton de l' nekonata knabino. Li aŭdas sole ŝian voĉon, sole la sorĉoplenajn tonojn de simpla, sed tamen tiel poezia kanto popola ...

Subite ŝanĝiĝis la kortuŝanta, dolĉe elegia tono de l' kanto en tonon petolan kaj la sonoj de l' arĝenta sonoranta voĉo tremetas en silenta aero vespera kiel petolemaj demonetoj disportantaj tra la mondo bravan gajecon en la homajn korojn ...



Mozart staras kvazaŭ en sonĝo. En lia animo komencas tagiĝi – la kanto knabina efikas kvazaŭ sorĉo

...

Silueto de l' knabino malproksimiĝas pli kaj pli, ŝia kanto malaperas, ĝis fine mortas ...

Mozart staras ankoraŭ sur la sama loko senmove kiel statuo. Sed en lia animo estas lume – la animpremiteco, la senespero estas tute forpelitaj.

Antaŭ lia spirita rigardo vidiĝas klara, ĝojiga perspektivo; ĉar kie simplaj knabinoj kantas tiajn

kantojn, kiajn li ĵus aŭdis, tie oni devas havi komprenon por natura muziko, pri kiu li ĉiam revas – tien estas neeble, ke lia verko - - -

Li ne finis la penson.

Refreŝigita kiel neniam antaŭe li malsupreniris la altaĵon kaj pasiginte gajan vesperon en la rondo de l' amikoj, la duan tagon matene li denove daŭrigis sian laboron...

La sufoka laceco estis pasinta. Freŝa, kiel en tagoj de la plej flua kaj libera kreado, Mozart laboris nun kun la konfido je siaj fortoj, ĝis li finis „Don Giovanni-on“, la verkon – senmortan

Tradukis Josef Grňa

El la libro J. Arbes: Rakontoj. Ferdinand Boháček, Jevičko 1908

Pri kamentubisto

Jiří Wolker

Kamentubisto portas ne nur ŝtupetaron kaj nigran vizaĝon. Kamentubisto portas ankaŭ feliĉon. Tion scias ĉiuj homoj kaj precipe ĉiuj, kiuj havas butonojn sur surtuto. Kiam li preteriras, rapide ili mankaptas butonon kaj pensas pri tio, al kio ili sopiras. Kaj efektive ilia deziro plenumiĝas, ĉar la homoj faras tiel jam de longe kaj faros tiel, kiom longe irados kamentubistoj sur stratoj. Se tio ne estus vero, certe ili tion ne farus.

Do vidu: ĉiuj homoj povas esti siamaniere feliĉaj. Ili bezonas por tio nur butonon kaj kamentubiston.

Tion bone sciis Hanĉjo, malgranda orfo. ĉar li estis kompatindulo, vivanta de tago al lago sur pavimo delonge kaj havis multe da belaj deziroj. Li povis deziregi bulkon, bileton por karuselo, mortintan panjon aŭ pometon, kiajn vendis mastrinoj en pankorboj sur la urboplaco de Sankta Jakobo. Ĉar li nenion havis, la mezuro de lia feliĉo estis granda.

Sed jen unu grava malhelpaĵo: la malgranda Hanĉjo ne havis ĉe sia disŝirita jako kaj ĉe ĉarpiigita pantalono eĉ unu butonon. Jakon kaj pantalonon li ricevis de bonaj homoj, sed vi ja scias, ke ankaŭ la bonaj homoj ne donas sian multvaloraĵon. Tial, kiam li ĝin ricevis de ili donace, ĝi estis jam multe eluzita kaj ĉiuj butonoj estis for. La bonfarantoj, kiuj donis al li la vestaĵon, ne pensis, ke tia malgranda knabo bezonas butonojn. Sufiĉe, ke ili kovris lian nudecon. Ankaŭ Hanĉjo komence ne pensis, ke al lia vestaĵo io mankas. Nur kiam li eksciis la sekreton pri kamentubisto, butono kaj feliĉo, malĝoje li pensis:

Mi ne povas esti feliĉa, ĉar mi tute ne havas butonon. Tio tro afliktis lin, ĉar li deziris esti feliĉa. Kaj kiu tion ja ne dezirus! De tiam li pensis pri nenio alia, ol kiamaniere havigi al si ian butonon. Por la ceteraj infanoj nenio malfacila, sed por Hanĉjo klopodo ne malgranda. Por havigi butonon estas ĉiam necesa ia paĉjo, kiu ĝin aĉetas, kaj ia panjo, kiu ĝin alkudras. Kaj tiuj du premisoj al Hanĉjo absolute mankis.

Hanĉjo volis perlabori monon por aĉeti butonon. Li portis akvon al unu sinjorino en la kvinan etaĝon, al alia li alportadis karbon en malgranda veturileto kun vilaa hundo, li iradis piede al vilaĝo por lakto, unuvorte li laboris, kiel povas knabo en lia aĝo.

Sed monon por aĉeti butonon li tamen ne perlaboris. La homoj pensis: kial doni al tiel malgranda knabo monon, li ĝin ne komprenas kaj plej verŝajne elspezus por frandaĵoj. Ili donos al li prefere ion por manĝi – tio pli taŭgos por li.

Kaj ili donis al li. Jen panon, jen fromaĝon, jen teleron da supo aŭ ian restaĵon de tagmanĝo. Kaj Hanĉjo, kiam li estis satmanĝinta, falis en tian

feliĉegon, ke li forgesis ankaŭ la butonon kaj kredis, ke sian feliĉon li atingos ankaŭ sen ĝi.

Sed kiam vespere li plene digestis la manĝaĵon kaj en la poŝo li havis nenion krom malsato, tiam forpasis lia tuta memkonfido, tuta forto. La sopirata butono komencis danci antaŭ liaj okuloj kun ĉiuj miraklaj ecoj. Precipe kiam li preteriris la butikon de butonfaristo, kie en elmontra ŝranko estis multaj amasoj da diversaj butonoj. Jen estis unuj por soldatuniformoj, aliaj por civilvestaĵoj. Unuj tute orumitaj kun belaj engravuritaj literoj, aliaj por maristoj kun bluetanta brilo de maro. Sur iuj estis kvar videblaj truoj, sur aliaj la truoj estis kaŝitaj sub brilanta metala supraĵo. Super ĉiuj brilis vico de grandaj perlamotaj butonoj, kiuj altiris la okulojn de Hanĉjo kiel magneto.

Ĉi tiuj certe alportas la plej grandan feliĉon, pensis Hanĉjo, sed versimile neniam mi atingos ilin. Tiuj certe estas ege multekostaj.

Tamen li rigardis ilin pli kaj pli avide, ĝis kiam sinjorino en la butiko rimarkis lin kaj, nekompreneble la fajron en liaj okuloj, lin forpelis.

„Foriru, malspura bubo! Nenion bonan montras viaj okuloj.“

Ŝi pensis, ke li volas ion de ŝi ŝteli kaj Hanĉjo hontigite foriris.

Kaj nokte, kiam li dormis en ejo super la kelo sur ĉifonaĉoj kun dek ankoraŭ pli malfeliĉaj homoj, la perlamota butono kaj la nefavora vizaĝo de la vendistino flugpendis en liaj songoj.

Kiam li tiom longe kaj longe sopiris vane, okazis al li foje, ke li ekvidis sur la strato knabinecon, kiu sur la mantelo havis ĝuste tian belan perlamotan butonon, kian li vidis en la butiko. Sed ne nur tion atentis Hanĉjo, li ankaŭ rimarkis, ke la bela butono nur pendas sur fadeno, kaj ke ĝi baldaŭ deŝiriĝos. Lia koro ekstremis pensante, ke la knabineco ĝin povus perdi kaj li trovi.

Jen estus la fino de liaj suferoj. Jam morgaŭ li povus ja havi tion, kion li nur dezirus.

Tial nerimarkite li turniĝis sekvante ŝin. Kion li tiom deziris, tio ankaŭ okazis. Ĝuste kiam la knabineco eniris la pordon de malalta domo, la butono disŝiriĝis kaj restis kuŝanta sur la pavimo, kaj ŝi ne rimarkis tion. Ŝi estis ja tre neatentema knabino, se ni konsideras, ke tio estis la sola butono, kiun ŝi havis, kaj ke pro ĝia perdo ŝi estis senigita de ĉiu feliĉo, kiu al ĝi estis alligita.

Hanĉjo ĝojkriis. Singardeme li levis la butonon kaj tenis ĝin en la mano. Ĝi ekradiis en la sunbrilo kiel gemo. Rapide li kaŝis ĝin en poŝon kaj ĉirkaŭrigardis.

La knabineco eniris nenion rimarkinte.

Hanĉjo malaperis ĉe la plej proksima stratangulo. Atenteme li transportis ĝin hejmen. Li demetis la jakon kaj elpruntis kudrilon. Fadenon li eltiris el

la ĉifonoj, sur kiuj li dormadis kaj tuj li komencis la alkudradon por esti preta antaŭ krepuskiĝo.

Sed tiam li ion ekmemoris. Li memoris la knabinecon, kiu ie ploras, ĉar ŝi perdis belan butonon. Eble ŝi eĉ ne scias, kiom da ĝojo ŝi estus povinta per ĝi gajni. Se ŝi sciis, kion povas influi butono kaj kamentubisto, certe ŝi estus pli atentema. Iam ŝi certe ekscios tion, sed la butonon ŝi ne plu posedos. Eble, ke ŝi neniam atingos alian, ĉar estas malfacile akiri butonon. Ŝi perdis ĝin kaj li ĝin ŝtelis. Ŝtelis? Ne, nur trovis. Ĉu li redonu ĝin?

Ne, tion Hanĉjo ne povis, ĉar multajn longajn tagojn li sopiris ĝin havi.

„Kiam ĝi alportos al mi feliĉon, mi ĝin redonos al ŝi kaj eble mi ion ankoraŭ aldonos“, li pensis.

„Sed ĉu mi retrovos ŝin poste?“

Liaj manoj tremis, sed li daŭre alkudradis.

La sekvantan tagon li eliris kun la butono kiel kun stelo. Sed ŝajnis al li, ke la homoj tro observus lin, se ili tiel rekte ekvidus ĝin sur lia ĉifonita jako. Tial li kaŝetis ĝin per mano.

Li timis ankaŭ renkonti la hieraŭan knabinecon.

Li vagadis, iradis kaj serĉis kamentubiston. Li pripensis ankaŭ, kion li deziru. Li decidiĝis por ora kastelo sur vitra monto kaj por oranĝo. Ĉirkaŭ tagmezo li ekrimarkis kamentubiston. Li estis nigra kiel negro, nur la okuloj estis bluaj kiel violoj. Rapide li turnis la paŝon al la trotuaro, sur kiu iris la kamentubisto kaj pli firme li ekpemis la butonon.

Lia koro en la brusto bategis kiel sonorilo.

La kamentubisto alproksimiĝis. Li marŝis trankvile kaj ridetis.

Hanĉjo estis pala kaj per glaciaj manoj li pretenis la butonon pli kaj pli.

„Kiam li alproksimiĝos je kvin paŝoj, mi flustros mian peton“, li pensis.

La kamentubisto estis apud li. Sub nigra barbo silenta, blanka rideto.

„Nun“ diris Hanĉjo, duonvoĉe ĝemeksopirante: „Ka - ste- lon kaj o - ran -“
Kraak!

La butono alkudrita per uzita fadeno kaj tro tirata de la mano de Hanĉjo disŝiriĝis kaj restis inter liaj fingroj eĉ kun fadena pedunklo kiel velkinta floro. La esperoj de Hanĉjo subite disfandiĝis. Larmoj aperis en liaj okuloj kaj ploro en lia gorĝo.

Li estis neesprimeble malfeliĉa, ĉar li opiniis tion puno pro la ŝtelo de la nepropa butono por sia feliĉo. Li tiom ĝemploris, ke la kamentubisto rerigardis kaj alpaŝis al li.

„Kio okazis al vi, knabeto?“ li demandis. Lia voĉo estis tiel pura kiel la kamentubisto estis fulgonigra. Sed Hanĉjo ĝemploregis tenante la butonon en la malpurigita mano.

„Ĉu iu traktis vin maljuste, aŭ vi perdis ion?“ La mano de la kamentubisto karestuŝis la kapon de Hanĉjo kiel varma ondo. „Mi prenis trovitan

butonon,“ li subite ekparolis. „Mi deziris kastelon kaj oranĝon. Tial mi hieraŭ prenis la butonon.“

Kaj li rekomencis plori.

„Kaj kies vi estas?“

Hanĉjo ne sciis, kies li estas. Li apartenis al neniuj, sed oni fartas tiel bone, se oni povas al iu aparteni.

La kamentubisto prenis la manon de la ploranta Hanĉjo kaj lin ekgvidis. Lia mano estis nigra kaj fulgoplena, sed Hanĉjo sub ĝia influo ŝanĝiĝis je humila ŝafido.

La kamentubisto kondukis Hanĉjon en malgrandan domon, ĝuste en tiun, kie malaperis la hieraŭa knabineto.

„Panjo kaj Lida, mi venigis al vi knabon, kiu ploras, ĉar li deziris kastelon kaj oranĝon!“

„Mi ne ploras pro tio“, diris Hanĉjo, „sed ĉar mi proprigis al mi butonon.“

„Nek kastelon nek oranĝon ni povas al vi doni,“ diris la edzino de la kamentubisto, „sed mi donos al vi tagmanĝon.“

Kaj ili donis. Ili lokis lin ĉe tablo kaj ili igis lin manĝi plenan teleron da supo. Unuflanke sidis la sinjoro kamentubisto – jam lavita kaj pura – sur alia flanko la mastrino kaj kontraŭ li Lida, kiu hieraŭ perdis la butonon.

Ili donis al li bonajn kaj afablajn demandojn. Kaj Hanĉjo respondis. Dum sia tuta vivo li ne parolis tiel multe kiel ĉi-okaze. Ĉion li rakontis, kiel soleca li estas, kiel li deziris esti feliĉa, kiel li serĉis butonon kaj kiel ĉio finiĝis.

La sinjoro kamentubisto kaj lia edzino ridetis. Lida rigardis lin per seriozaj kaj admirantaj okuloj kaj la supo vaporfumis kaj odoris kiel incenso en preĝejo.

„Vi plaĉas al mi, knabo,“ diris fine la kamentubisto, „kaj se vi volas, vi povas resti ĉe ni kaj mi instruos vin kiel esti kamentubisto. Cetere ankaŭ al Lida estas malgaje esti sola.“

La mastrino kapjesis kaj la okuloj de Lida ekbrilis. Hanĉjo ĝoje kapkonsentis kaj per granda peco da viando li kovras la grandan ĝojon, por ke ĝi ne forkuru, ĉar ĉi tie la manĝaĵo eniris ne en la stomakon, sed rekte en la koron.

Hanĉjo lernis esti kamentubisto.

Esti kamentubisto signifas feliĉigi homojn. Sed kamentubisto ne povas partopreni feliĉon pere de butono, ĉar li feliĉon kunportas, li ĝin ne povas ĝui.

Sed Hanĉjo ne rimarkis, ke li estas esceptita el tiu favoro kaj li estis feliĉa eĉ sciante, ke li mem kiel kamentubisto ne povas manpreni butonon antaŭ alia kamentubisto kaj deziri la plenumon de tio, kion li sopiras.

Li grimpis sur altaj tegmentoj proksime al la ĉielo kaj tra kamentuboj li malsupreniris en fulgoplenajn fajrujojn. La homoj ŝatis lin, ĉar li sciis

purigi la kamentubojn kiel kaĝetojn, tiel ke la manĝaĵoj sub ili preparataj similis al puraj kanarioj.

Li preparis por suno kaj aero la vojon al la homa fajro. Tio estas bona laboro.

La tempo forfluis kiel akvo kaj Hanĉjo maturiĝis rapide. La sinjoro kamentubisto estis pri li kontenta, la edzino ŝatis lin kaj Lida? – Ho, tiu jam delonge pardonis al li eĉ tion, ke li iam alproprigis ŝin mem.


Tiam Lida jam maturiĝis kiel betulo kaj Hanĉjo estis kiel fago.

Se vi iam renkontos lin, bone vi lin rekonos. Li aspektas same kiel ĉiu alia kamentubisto, sed li havas poŝojn plenajn da butonoj kaj li donas ilin al ĉiu, al kies jako ili mankas, ĉar li ne volas porti la feliĉon nur al unuj kaj al aliaj ne.

Esti kamentubisto signifas feliĉigi homojn, kiuj havas butonojn. Kiam ĉiuj homoj havos butonojn, tiam ĉiuj estos feliĉaj.

Tradukis J. Kožený

KNIŽNÍ TIP:



Uzavírám vás do svého srdce: Životopis Josefa kardinála Berana

Stanislava Vodičková

2. doplněné vydání

(CDK, ÚSTR 2018)

Výpravná publikace obsahuje čtivě psaný životopis kardinála Berana, desítky fotografií a CD s nahrávkami Kardinál Beran vzpomíná a Projev ke smrti Jana Palacha.

Nový výběr esperantské četby:



<http://eduinf.waw.pl/esp/lern/librejo/index.php>



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7